

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

4.VII.1947

Návštěvníkům kursu B

Vyučování gramatiky v kursu B zdá se vám býti nudné. Ředitelství školy volilo látku těžší, jsouc vedeno snahou prohloubiti vědomosti samideánů v gramatice tak, aby nezůstali pouze dobře mluvícími esperantisty, nýbrž aby byli schopni též esperantu vyučovati a státi se tak nejen dobrými pracovníky pro esperanto, ale i v esperantu.

Dr. A. P i t l í k :

X.N. Ĉe la maro

Stýská se mi, stýská ...

Stýská se mi, stýská,
po mém sluníčku.
Zapadlo mi v dáli.
Kéž na chvíličku!

Stýská se mi, stýská,
po té, co mám rád -
Slíbila ses vrátit -
Díky tisíckrát!

Přestane se stýskat,
bolest pomine,
ret Tvůj na mém retu,
zas až spočine!

Rebrilis sun' en vasta mar'
Kun lasta lum' vespera,
Ni solaj vidis, - silenta par'
En amo senespera.
Leviĝis akvo kaj nebul'
La mevoj flugadis krie
Eklarmis via bel-okul'
Rigardis min pasie.
Larmoj falis sur via man'
Genuis mi kun tremo
La larmojn de via blanka man'
Mi trinkis for kun ĝemo.
De tiu horo turmentas min
Sopiro kaj doloro.
Per larmoj de la bel-virin'
Malsanas mia koro.

NOVAĴOJ

Dnešní festivalové představení na přírodním jevišti. J. Štolba. Na letním bytě. Sehraje SDO z Jablonné. Vstupenky jako obvykle.

La vetremado hieraŭ ne okazis. Oni aranĝos ĝin hodiaŭ posttagmeze je la tria horo. Kunveno de partoprenantoj sur la strando ĉe la Esperanta flago. Venu precize!

Hieraŭ antaŭtagmeze alvenis jugoslava samideano Dittrich. Hodiaŭ ni atendas alvenon de sveda samideano Jenssen. Bonvenon al ili!

GRAVA AVERTO!

La redakcio de V.V.D. Avertas ĉiujn lernantinojn de S.E.L., ke viroj, portantaj ĉi tie longajn kravatojn, plenajn de "rondetoj" penas tiamaniere reklami, ke ili estas por la daŭro de la kursaro "liberaj". Per tio ili povus ne sole endanĝerigi la ĉastajn virtojn de niaj ĉarmaj lernantinoj, sed samtempe minaci kason de nia redakcio, kiu honeste nutras sin per la anoncoj pri konatiĝo kaj edziĝo.

Teatra skandalo

Oni povis rimarki, kiel granda intereso kaj komprenemo por la prezentadoj de Teatra festivalo montriĝas ĉe la partoprenantoj de E-kursoj. Unu A-kursano en uniformo de eksterlanda militisto estis tiom enpenŝiĝinta kaj ravita de la prezentado, ke li forgesis fermi la buŝon kaj eligadis strangajn sonojn, similajn al segado de trunko-stumpo. La apudsidantoj.

Sleĉně Aniĉce Biskupové k sobotním jmeninám vše nejlepší přejí dva samideáni z A-kursu AR a FS.

Eŭropano demandas negron:

- "Ĉu vi estas negro?"

- "Jes, kiel vi divenis tion?"

- "Ha, tre simple. Laŭ via Esperanta elparolo."

(Stalo se v baru). P.R.

D ŭ l e ž i t é UPOZORNĚNÍ

Ztratila se světlešedá kožená peněženka s tímto obsahem: předplatní lístek hotelu "U Jelena", na jméno Eva Rašková, as 500 Kčs, snubní prsten z AKV kovu. Ztráta se stala cestou z koupaliště. Nálezce bude odměněn. Nález lask. Odevzdejte ředitelství Školy esperanta.

ANEKDOTOJ:

Amo: Li diris al ŝi: "Mi devas forveturi Brazilion kaj tie mi restos dum kelkaj jaroj. Ŝi plorante respondis. "Sed vi devas al mi skribi ĉiutage, mi atentos." "Jes, mi skribos, sed diru al mi, mia karulino, ĉu vi vere min tiel amas aŭ ĉu vi kolektos poŝtmarkojn?"

Ankaŭ elemento.

Amiko, nomu kvar elementojn. "Fajro, akvo, aero, biero." Kiel vi povas diri, ke la biero estas elemento? Tute bone, ĉar nia panjo diras al paĉjo, kiam li trinkas bieron, ke li estas en sia elemento.

Laŭ Budha.

Ĉu vi kredas je migrado de animoj?

- Jes, mi estis iam azeno.

- Kiam estis tio?

- Tiam, kiam mi pruntis al vi 100 kronojn.

-pn-

ANONCOJ.

La damo, kiu al mi hieraŭ en la C-kurso tro kore ekpemis la manojn, estas petata pri rendezuo. Skribu sub "Stýská se mi".

LETERKESTO.

Al niaj kunlaborantoj (ne kolaborantoj!): Dankojn por la senditaj artikoloj. Sed ni ŝatus pli viglan kunlaboradon de niaj lernantoj, ĉar la gazeto estas via kaj pri vi!

AL S-ANO N.V. Via artikolo estis tre bona, sed post forstreko de ĉiuj eraroj restis nenio por preso. Pardonu kaj koran dankon por via granda peno.

AL S-ANO I.A. Vian anoncon ni ne povis presi pro ĝia malmorala flanko.

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

21.7.1947

UVÍTACÍ PROSLOV PŘESEDY MNV V DOKSECH
p. V. Vachušky, k zahájení Letní školy
esperanta.

Dovolte mi, abych jako předseda MNV v Doksech u Máchova jezera vyjádřil vám srdečně přivítání jménem jmenovaného výboru a také celého obyvatelstva našeho města, které vás přátelsky přijalo a raduje se z vaší návštěvy. Zvláště vítám hosty z ciziny a mezi nimi paní Annu Alamo ze Švédska, která k nám přijela ze země námi ctěné a milované, dále pana J. Verdunka z Holandska, ze země, jejíž přízně si velmi vážíme. Byl bych šťasten, kdybyste si z našeho města odnesli nejlepší vzpomínky. Vaší záslužné práci pro mír přeji mnoho zdaru.

SOMERA ESPERANTO-LERNEJO en Doksy
bonvenigas vin, karaj gekursanoj!

Ni esperas, ke vi sentos vin bone en nia rondo familia kaj kredas, ke vi ne nur bone lernos, sed ankaŭ vin bone amuzos. Ni volas krei en Doksy veran, amikan, esperantistan somerrestadejon. Kaj vi certe helpos al ni plenumi tiun ĉi taskon.

Viaj instruistoj.

Ant. Slanina.

AL AMO /Al sveda samideanino Anna Alamo.
Vokis min jam de malproksime,
sonanta dolĉa voĉ' de l' esper'
al amo kristana.

Ĉarma Alamo,
vokas al Amo,

fratiĝu homoj, popolo esperanta,
per nia kara lingvo "verda"
pacon eternan ni defendu!

KORTUŜAJ SALUTOJ

Hieraŭ vespere vizitis samideanino Anna Alamo kaj samideano J. Verdunk la lokan someran teatro-scenejon festivalan, kie ili salutis la publikon en la nomo de sveda kaj nederlanda nacioj. Forta aplaŭdo de la alparolita publiko pruvis, ke niaj ŝatataj gastoj scias tuŝi la ĝustan kordon en koroj de la ĉeĥa popolo. Speciale la saluto NAZDAR!, dirita de A. Alamo entuziasmigis ĉeestantojn. Niaj eksterlandaj gastoj devis doni siajn subskribojn en la memorlibron de aktora societo de Praha gastanta tie ĉi. La salutojn interpretis s-ano V. Špŭr, kaj inspektoro J. Rýdl, estro de la festivalo, dankis al la parolintoj.

Same la parolado de s-anino Alamo en la restoracio "U jelena" pri la sveda helpo al suferantaj nacioj tre kortuŝis gesamideanojn de la Somera E-lernejo. Ni esperas, ke niaj eksterlandaj gastoj nin ne forgesos reveninte hejmen kaj ofte rememoros pri Doksy. Ni deziras

al ili sukceson!

NOVAĴOJ

Dnešní festivalové představení na přírodním jevšti: F. Šrámek: Měsíc nad řekou. Sehraje SDO K.H.Mácha, Doksy. Zač. V 21 h. Vstupenky budou včas vydány.

NIGRULO en kurso A.

Kurson A vizitas nigrulo s-ro Heypold Johnson, parolanta 5 lingvojn. Li estas interesa nigrulo, ĉar li volas verdiĝi.

Deĵoranta policisto trovis en parko dormantan nekonatan sinjoron. Dormanta sinjoro estis senvestita ĝis banvesto. La vestaĵoj estis zorgeme falditaj kaj kuŝis apud li. La policisto raportas: "Mi trovis lin tremantan pro malvarmo, kovritan per gazeto. Grincante per la dentoj li vokis: Fermu la fenestron!"

LINGVA ANGULO

Malbona kolo estas kolaĉo ...

malbona karto estas kartaĉo ...

samideano laboranta por la sama celo estas porcelano ...

fraŭlinon amuzi ne estas am-uzi ...

Sentencoj

Sensenco ne estas sentenco -

sentenco ne estas sensenco.

Malgrandaj virinoj inventis kalumnion:

Ne kisu do ilin plu sur la frunton!

ANONCOJ (pagendaj post la plenumo de l' peto)

■ Mi serĉas mian maljunan (pardonu), malnovan markizon kaj hejmajn amikojn de la pasintjara somera E-kurso en Doksy. Sciigojn afable sendu sub la signo "Markizino atendas".

■ Kiu povas sciigi al mi, kie perdiĝis mia sekretario Jozefo. Lastfoje oni lin vidis ĉe la Máchalago. Sciigoj estos pagataj. Serĉas Anna Alamo.

■ Mi petas virinmalamikon, kun kiu mi sidis en vagonaro al Doksy, ke li sendu sian adreson al "Suferanta edzo".

■ Ĉu vi volas ŝpari poŝtelspezojn? Aĉetu de mi paron da poŝtaj kolomboj. Farmo "Kolombino" apud Staré Splavy.

■ Bela, silentema kaj neparolema edzino, kies nomon ni ne povas malkaŝi, ĉar ŝia edzo Zdeněk Roka tre kolerus je ŝi, interŝanĝos sian edzon por Esperanto-lernolibro. Skribu proponojn sub la signo "Ĉambristino de sinjoro markizo".

■ ... a tohle není vtip: Učebnice esperanta za Kčs 28,- ke koupi v knihkupectví pana Kratochvíla v Doksech.

Časopis VERDA VOĈO DE DOKSY řídí pětičlenný redakční kruh, který se schází v 00 5 hod. Krátké příspěvky pro časopis vítány. Redakce.

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

22.7.1947

HIERAŬA EKSKURSO AL STARÉ SPLAVY

Post "satiga" tagmanĝo, kiun ne ĉiuj fortaj kursanoj sen malbonaj rezultoj eltenis, oni decidis ekskursi. Post komuna interkonsento (kontraŭstaris nur 78 proc. da ĉeestantoj) oni komencis la pilgrimon al Staré Splavy. Bedaŭrinde neniu havis certajn scion pri la loko, sed ĉiuj tamen kun rido sur lipoj ekmarŝis - bedaŭrinde tute kontraŭan direkton - sed tio ne gravis, Esperantistoj estas esperemaj. Ili tute fidis al energia gvidado de samideano Jelč. Kaj post laciga marŝo ni fine atingis Staré Splavy. Tie ni eksidis sur la monteton en granda rondo familia. Duonhora paŭzo, kiu daŭris du horojn, estis plenigita per societaj ludoj. Precipe interesa estis ludo "ĝardenisto", kiam oni vendadis ĉerizojn. Intereso pri ĉerizoj estis tiel granda, ke unu samideano aĉetis 100 kg da ili kaj poste konstatis, ke li ne povos ilin konsumi pro sia progresinta maljuneco. Li ne timis ventrodoloron, sed kordoloron. Oni konstatis, ke la gelernantoj de Esperanta lernejo tre bone progresas, ĉar dum la ekskurso parolis perfekte ĉeĥe. Ni faras la rimarkon sen komentario..

SUR LA LAGO DE MÁCHA
(Dr. A. Pitlík)

Ha, lago de Mácha, la amopoet'!
"Kun mi en la barkon rapidu,
mi vian hararon orblondan, knabin',
trempiĝi ne lasos - min fidu!

Estante pelata de milda zefir',
balance moviĝos la barko,
fabelon mi volas rakonti al vi
pri amo kaj unu monarko."

La koron konfidis al mi la knabin',
feinoj dancante nin lulis
kaj en la mistere ondanta nivel'
arbaroj sin klare spegulis.

"Ho, kisu min, knabo, kisadu min plu,
ve pri la perditaj momentoj,
la celon maltrafus ja nia dezir'
sen amo, sen larmoj aŭ sentoj." -

Kapturon sentante, revenas la du
al urbo, ebriaj de amo. -
Sur lago de Mácha, sub Bezděz-katstel'
buntiĝis ilia programo . . .

Trad. prof. M. Lukáš.

NOVAĴOJ.

Dneŝnĵ festivalovĵ predstavĵnĵ
na prĵirodnĵmĵ jeviŝti
Hilbert.

V i n a.

Sehraje soubor z Bělě p.Beždězem
Zaĉatek v 21 hodin.

Letero el Kopenhago,

En ĉi tiu tempo mi ofte pensas pri Doksy,
kie mi antaŭ unu jaro iris en la stratoj,
rememoris
sur lago mian patrujon, vidis Bežděz kaj ĉiam
estis kun la amikoj kaj gajaj ĉeĥaj samideanoj
kaj – ne forgesu!-inoj. Mi legis en Esperanto
Intern. pri la nunjara aranĝo kaj mi sentas
envion je la feliĉuloj, kiuj povas partopreni

Via Arne G l u d.

TELEGRAMO.

Nia redakcio ĵus ricevis de nia speciala
raportisto gravan sciigon, ke hodiaŭ
antaŭtagmeze je la 25a horo 75 minutoj
alvenos al ĉi tiea flugplaco speciala
flugmaŝino kun korboj da freŝaj hanakaj
kukoj. SEL-ejo sendis tien du hanakojn el
Prostějov kiel delegacion por akcepti valoran
sendaĵon, -ř-

Nia **Alamo** proponas jen siajn lipojn al tiuj
samideanoj, kiujn ŝi ankoraŭ ne kisis.

SOLVU !

Kiu arbo ne havas branĉojn?
Kiu arbo kreskas sur la haŭto?
Kiu falko neniam flugas?
Kiu kantistino ne bezonas voĉon?
Kiu jako varmigas tutan korpon?
Kiu luno troviĝas en la tero?
Kiu ovo enhavas eblaron?

Solvinto ricevos de mi libropremion – Ŝolc

ANEKDOTO.

En zoologia ĝardeno antaŭ la azenoj. Knabo:
"Paĉjo , ĉu ankaŭ azenoj geedziĝas?"? Patro:
"Nur azenoj ... mia filo, nur azenoj".

ONI KRITIKAS "VERDAN VOĈON".

La presisto /antaŭ/:

"Kia bela gazeto ĝi estas, estus domaĝe, se oni
ne presigus ĝin."

/post/:

"Ĉu vi ne havas ion pli bonan?"

El letero de entuziasmulo.

"Denove nova, bela gazeto, nia movado
kreskas...Abonu ĝin!"

Pesimisto.

"Denove oni atakas mian poŝon."

Moralisto.

"La gazeto estas malmorala, mi eĉ ne legis
ĝin. Hontiga estas precipe la sentenco pri la
kisoj sur la frunton."

Klaĉistino.

"Oni diras, ke la redaktoro estas sed tio
estas nur bagatelaĵoj rilate al liaj malvirtoj."

Sincera homo.

"Leganto gazeton, oni konstatas, ke la pilsena
biero influis cerbon de la redakcia rondo."

ANONCOJ.

Vendeblaj postsezonaĵ ĉerizoj!

De Markizino mi aĉetis 100 kg da ĉerizoj kaj
mi timas, ke mi ne povos ilin konsumi (ĉar mi
estas jam sufiĉe maljuna) mi vendos 90 kg en
publika aŭkcio, kiu okazos hodiaŭ post
tagmanĝo en salono de restaŭr. "Jelen". Unu
kilogramo po 5 Kĉs. Proponojn petu de s-ro
Kokineto.

Juna, forta, eleganta Ĉe-metoda instruisto
proponas privatajn lecionojn al bela fraŭlino
sub la kondiĉo, ke la konversacio okazos nur
en duopo. Sendu proponojn sub la signo. "Mi
nur akceptas dolĉan rekompencan".

Direktoro serĉas sekretariinon. Skribu sub
signo "Somera Esperanto-lernejo".

Mi serĉas tempon, perditan hieraŭ en teatro.
Skribu sub signo. "Dormanta subtila vizitanto
en verda ĉapo" (Rimarko de redakcio: oni
miros, se iu povos dormi, sidante inter du
belaj samideaninoj.)

Mi amas, kiu respondos? "Mi".

Našim žákům v kurse A

"Dum mia vojaĝado neniam mi estis malsana, eble pro la belaj travivaĵoj..." To je věta z přednášky našeho vzácného hosta Anny Alamo (a kdo je slyšel, jistě se nad nimi zamyslel. Zatím, co se jiní baví, esperantisté pracují. Je mylné tvrzení, že jenom péče o tělo udržuje zdraví. Podstatou zdraví je duše, neboť duch je to, který tělo udržuje. Že tato teze je pravdivá dokazuje, že Edison, ačkoliv spal jen 4 hodiny denně, přece svou prací přinesl světu obrovské hodnoty. Neříká se také nadarmo, že esperantisté nestárnou. Zjistili jsme, že jste horlivými žáky. Chceme z vás vychovat bojovníky za vznešenou myšlenku sbratření národů. Naše hnutí potřebuje dobré pracovníky a my plně věříme, že se jimi stanete.

Fr. Pel:

For, barieroj, for:

(Al ĉiuj esperantistoj)

Bezonas nepre ni
amikoj ĉiuj esti
kaj ĉiam al homar'
la amon manifesti.

Mi kredas, mia stel',
kara kaj unusola,
vi venkos malamon
kiel vort' apoŝtola.

Supren do, nia stel',
super la nubojn flugu,
neniam timeme
el batalkampoj fuĝu!

For, barieroj, for-
naciaj, alispecaj -
eldiru dezirojn
la koroj homaj, decaj!

Kaj poste venos tag-'
plej granda en eterne,
kiam la malbonec'
pereos en infero.

NOVAĴOJ.

Dnes v rámci divadelního festivalu veselý taneční večer v Masarykových sadech. Vstupné není započteno ve školném. Doporučujeme k návštěvě tento podnik. Přejeme příjemnou zábavu.

EKZEMPLO POR EDZOJ!

Nia ĉefredaktoro renkontis en Doksy amflustrantan paron. Věra ekzemplo de l'amo. Nia ĉefredaktoro intencis intervjui ilin pri la beleco de la vespero kaj alirinte ilin li surpriziĝis, geamantoj estis geedzoj el Val. Meziříčím, gelernantoj de SEL-ejo. Ege surprizita redaktoro kaŝe foriris por ke li ne interrompu aman flustradon. Edzoj! Jen l' ekzemplo imitinda (sed nur kun siaj edzinoj, ne kun liaj)

VERDA STRANDO ĈE MÁCHA-LAGO.

Eĉ la sabla strando povas verdiĝi, tion pravas amaso da esperantistoj.

LAŬLEĜA KOREKTO § 19.

Nia redakcio ricevis korekton de samideano kun verda ĉapo, laŭ presa § 19 ni korektas. Ne

estas vero, ke li dormetis en teatro inter du dormaj samideaninoj, sed estas vero, ke li profunde dormis. (Rim. de red. : oni ne miru ĉe lia aĝo).

NOVA SENSACIO.

Granda konkurso (nur por sinjoroj, kiu sinjoro havas la plej vilajn krurojn? Konkurso okazos dimanĉe la 27-an de ĉtm. en la kastelo Bezděz. Oni mezuros densecon kaj longecon de haregoj. Gajninto de la konkurso ricevos donacon. Anoncojn akceptas sinjorino Rašková.

LERTA ĜARDENISTO.

Oni rimarkis, ke ekzistas lertaj ĝardenistoj, kiuj ne nur fondas Internacian ĝardenistan fak-
asocion, sed lerte kulturis flor-INOJN sur la laga strando, malgraŭ la aserto, ke sur la strando povas kreski sole kaktusoj.

NOVA MODO.

Hieraŭ ĉe Jelen oni vidis s-ron Mon-sinjoron, kie papili-kravato estis alkudrita de ĉarma "LUPETINO" al la ĉemizo. Ni supozas, ke tio estas nova modo, sed ni miras, kiamaniere tiu samideano demetos sian ĉemizon.

ANONCOJ.

Kvin ĉarmulinoj serĉas partnerojn por esperanta konversacio. Skribu sub signo "Bonaj spertuloj".

Mi serĉas belan, junan fraŭlinon, kiu helpus al mi ĉiuvespere kompletigadi Plenan Vortaron. Proponojn kun fotografiaĵoj adresu "Kuraĝulo el kurso A"

DEMANDOJ.

En kiu jaro aperis Esperanto?

Kiom da literoj en la esperanta alfabeto havas supersignojn?

Kiu tradukis "Hamleto" en Esperanton?

Kio estis spesmilo ?

Kion signifas la vorto GROTO (respondu esperante).

Kiom da korelativaj vortoj estas?

Kio estas OOMOTO?

ANEKDOTOJ.

La diskuto. Du sinjoroj renkontas unu la alian en la strato. La unua estis tre dika homo, la alia tre maldika. Dikulo (al maldikulo). Rigardante vin, oni devas pensi, ke estas nuntempe granda malsat-mizero. Maldikulo: Kaj rigardinte vin, oni pensas, ke vi estas la kaŭzo.

Ĉevalo kaj azeno. Ĉevalo kaj azeno interdiskutas, kiu estas pli valora ol alia. La azeno diras: "Ĉevalo, ne estu tro fiero, via fiero estas ridinda. Vi ĉevaloj estos anstataŭigitaj baldaŭ per la aŭtomobiloj, sed azenoj ĉiam estos.

En zoologia ĝardeno. Filo: "Paĉjo, ĉu la azenoj edziĝas?" Patro: "Nur azenoj".

Singardema. Ĉu vi vidis policiston? - Ne! - Mi dankas. Bonvolu doni al mi vian monujon.

Absolute. Ĉu vi ne hontas ? Vi ja venas hejmen el la bierejo nur frumatene. Estas nun la kvara. - Se mi estus kuŝinta en la lito, nun ankaŭ estus la kvara.

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

25. VII. 19 47.

LA DEK DEVOJ DE L' ESPERANTISTOJ.

Bone sci la lingvon, traktu ĝin kun respekto kaj lasu la vers-faradon al poetoj. - Esperanton uzu parolante, studu legante kaj ne fuŝu skribante. - La plibonigistoj diskutu: vi Fundamenton sekvu kaj fidela restu. - Propagandu ĉiam, ne ĉie: klarigu, ne prediku; rakontu faktojn, ne esperojn. - Kion vi povis lerni nur en unu semajno, ne instru en unu horo: el malgravaĵo ne faru regulon kaj el regulo ne faru malgravaĵon. - Verkante en Esperanto ne kredis interesa, kion nacilingve neniu legus: ne imagu, ke preseraroj plibeligas libron: ne malesperu, se mankas aĉetantoj. - Al loka grupo kaj nacia asocio aliĝu, la kunvenon vizitu: Esperante parolu. - Atentu, ke internacia lingvo vivos nur per uzado; memoru, ke tial internacia organizaĵo estas necesa: senlace varbu por UEA - Legu gazeton, por koni novajn faktojn: abonu, por ke ĝi povu ekzisti: kunlaboru, por ke ĝi estu interesa. - Por Esperanto, kiel movado, agu: por ĝi, kiel realaĵo pagu kaj kiel altan idealon konservu ĝin en via koro.

UEA-IEL.

Eliphas Lévi:

Filo s o f i c k é krédo.

*Já věřím v neznámo, jež zosobňuje bůh:
je dáno bytostí, je dáno nekonečnem,
ideál nadlidský, v něž vhrroužen moudrých duch
vítězná laskavost a chytrost ve skutečném.*

*Já věřím v nejisto, jež jistotu mi dá,
já věřím v pravdivost, jež ničím neochabne,
já věřím v naději, jež duší uhlídá,
věda, že před láskou i smrtící zbraň slábne.*

*Já věřím v ideál, jež nám se uskuteční,
v těch, kteří milují, jsou dobří, duchaplní.
Zásady víry mé mi v zákon vesmír zvěční
a církev má jsou ti, kdož spravedlnost plní.*

Dnešní představení na přírodním jevišti: F.X. Svoboda: Poslední muž.
Sehraje SDC Sloup v Čechách.

Raporto pri konkurso sur lago.

Konkurson partoprenis ok boatoj. Je la kvara horo la boatoj ekveturis el haveno Doksy direkte al Staré Splavy, kie ĉe verda standardo estis la celo. Nia malnova s-ano Pytloun servis kiel arbitracianto. Unuan premion, la libron "Lanternisto" ricevis s-ano Jaroslav Jestřáb, la duan Braslavec, trian Šob, kvaran Hájek kaj kvinan Obruča. S-ino Rašková disdonis libropremiojn al la venkintoj, dum ili estis fotografataj de s-ano Slanina.

La reveturo estis tre interesa, ĉar ĉe la remiloj de la "organiza" boato sidis ges-anoj

Slanina kaj Rašková, kiuj remis tiel elegante, ke oni supozis, ke temas pri ia ekzotika danco sur akvo. La rezulto fine estis, ke malnova mara lupo s-ano Jeřábek devis per sia sperta mano gvidi la boaton al la haveno Doksy. Nur al tiu ĉi cirkonstanco oni dankas, ke la Ĉeh-instruisto Šolc, nia redaktoro Slanina kaj ĉarma s-anino Rašková ne dronis. Al "malnova mara lupo" ni esprimu dankon.

Agrabla surprizo por la Esperanto-lernejanoj en Doksy. Ĵus ni malkaŝis, ke ni ne devas timi morton pro malsato kaŭze de malgrandaj porcioj, prezentitaj al ni en certa hotelo, ĉar ni havas sekretajn provizojn, ekzemple Lardon, Kokineton kaj "vir-anseron", kiun unu s-ano kaptis dumvoje al Doksy.

K ZÍTRĚJŠÍM JMENINÁM našich Aniček vše nejlepší přeje REDAKCE .

ANEKDOTOJ

En lernejo. Sinjoro instruisto, demandas Francisko: ĉu povas esti punata tiu, kiu nenion faris? Ne, estas la respondo. Tre bone, ĝojas Francisko, mi ne havas matematikan lecionon.

La sonĝo. Terure, kion mi sonĝis lastnokte.- Kion? -Ke mi estas esperantisto. - Kaj tio estas terura? - Jes, mi ja ne sciis Esperante.

Konversacio.

- Ĉu vi parolas Esperanton?
- Kiu?
- Vi!
- Mi?
- Jes!
- Ne.

ANONCOJ.

Sep (7) "Copaninoj" deziras rendevui kun sep (7) viglaj oficistoj (eble ankaŭ sufiĉus la kursgvidantoj) de grado B. Skrihu: Forte, kuraĝe kaj elegante.

ĈAR nur unu sola "Copanino" premis la manon de ĉerta sinjoro, estas malfeliĉegaj ĉiuj aliaj, ĉar ili ne povas partopreni la rendevuon. Signo: Stýská se mi, stýská.

ĈU la sekretario de redakcio povus afable sciigi al mi detalajojn pri sinjoro direktoro, kiu serĉas sekretariinon pere de anonco en V. V. de la 22a VIIa. Mi interesiĝas pri lia alteco, numeroj de ŝuoj kaj koloma, kiom li enspezas pomonate kaj ĉu li posedas aŭtomobilon.

LETERKESTO.

Respondo al sinjoro "Kisumin". Vi demandis, kio estas amo. Nun mi resondas al vi. La amo estas tiklado ĉirkaŭ la kolo, kiun oni ne povas grati. "Sperta" s-anino.

Al s-ro N.Z. en D. Ĉiu havas la rajton labori per sia plumo. Sed anstataŭ por skribado estas pli bone, se kelkaj ĝin uzus por kirli pudington, kio estas unika recepto por fari plum-pudington.

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

26. VII. 1947.

ESPERANTO 60jara ---- 60 let ESPERANTA
1887 – 26.VII. - 1947

Hodiaŭ festas la tutmonda esperantistaro grandan feston, la 60jaran datrevenon de la estiĝo de Esperanto. La 26an de julio 1887 eliris en la Varsovia presejo Kelter maldika, grizkovrila tridekopaĝa broŝureto, enhavanta 16 gramatikajn regulojn kaj 917 radikojn de la "Lingvo Internacia", kies aŭtoro "estis Dro Esperanto", humila okulkuracisto, kiu post jaroj da interna kaj ekstera batalado, da mizero kaj penego kuraĝis aperigi libron, kiu entenis en si la ĝermon de la lingva revolucio, kiu famigis la nomon de **Dro L. L. Zamenhof** kaj fondis tutmondan movadon por la helpa lingvo universala Esperanto.

60 jarojn jam Esperanto servas al la homaro, ĝi fariĝis lingvo viva, kies interna ideo gvidas la homojn al reciproka interkompreniĝo, al eterna paco. Oni povas hodiaŭ kuraĝe diri, ke en "Esperantujo" la suno ne subiras. La posedo al Esperanto fariĝis kultura riĉo por la opulo, nacio kaj ŝtato. Ne estas plu problemo, ĉu kaj kia lingvo fariĝos dua lingvo de ĉiu homo, ĉar Esperanto jam venkis.

VIVU ESPERANTO! AŬ ŽIJE ESPERANTO!

Pi

Dro L.L. Zamenhof:

Al la "Esperantisto".

En la bona hor'! Ni aŭdis la signalon
kaj bataleme saltas nia koro.
Konduku nin, komencu la batalon
sub bona stelo, en feliĉa horo!

Ne tre facila estos nia vojo
kaj ne malmulte ankaŭ ni suferos;
sed batalante, kun plej granda ĝojo
senhalte ni laboros kaj esperos.

Amikoj de proksime, malproksime
salutas vin, ho nia luma stelo!
Konduku nin, senhalte kaj sentime,
al nia granda, sankta, glora celo!

For estas jam la baroj de l'komenco,
l'unua muro estas trarompita,
kaj dolĉa estos nia rekompenco,
kiam la celo estos alveninta.

Verkita en la j. 1893 por la unua gazeto esp. "La Esperantisto", redaktita de Dr. Zamenhof kaj aperinta 1889 — 1899 en Nürnberg.

NOVAĴOJ

V rámci Letní školy esperanta dnes na letním jevišti divadelní představení.

Jar. Vrchlický: "Noc na Karlštejně" v esperantském překladu prof. M. Lukáše.

Pro účastníky kursu návštěva povinná. Začátek v 21 hod. Za nepříznivého počasí koná se představení v divadelním sále "U Jelena".

FILMADO SUR STRANDO.

Hieraŭ posttagmeze estis sur strando de la lago granda tumulto inter esperantistoj. Speciale niaj belulinoj estis en ekstazo. Kial? Venis ja filmisto de filmĵurnalo por filmi anojn de SELejo. Do ĉiuj ĉeestantoj havos okazon vidi sin en sia hejmloko sur ekrano de la kinejo.

Letní škola Esperanta v Doksech ve filmu!

Zvukovým filmovým týdeníkem nám bylo přislíbeno, že bude Letní škola Esperanta filmována. Při této příležitosti budou též učiněny záběry z divadelní hry Noc na Karlštejně, hrané esperantsky. Filmování bude pravěpodobně provedeno ve středu 30.července 1947.

BONVENON al ĉiuj vizitantoj kaj gastoj, kiuj venis por vidi la Esperantan prezentadon. Dankon por ilia subteno kaj morala kaj financa.

Somera Esperanto-Lernejo.

Instruisto: "Formu frazon kun kondicionalo.

Lernatino: "Mi dezirus, ke estu jam fino de la leciono".

"Ĉefafero estas ridi. Ne gravas, je kies kostoj."

"Popolo, kiu ne kuraĝas ridi pri si mem, ne estas matura."

La inteligentaj esperantistoj estas abonantoj de "Verda Voĉo".

"Verda Voĉo" kostas unu kronon. Efektive. Oni povas diri, ke ĝi estas la plej - malkara gazeto.

LINGVA ANGULO

MEM kaj SOLA.

La prezidanto mem preparas projekton; mi eĉ mem uzas tiujn vortojn; fiziko estas la nomo de la scienco mem; mi parolas ne pri la ago de la okokupo mem, sed pri la stato, en kiu ni troviĝas; mi amas lin, kiel min mem; malsaĝuloj kreskas mem sen pluvo kaj sem'; la vivo jam mem solvis la diritan demandon.

Ili apartenu al vi sola, sed ne al aliaj kun vi; se vi blasfemas, vi sola suferos; li sola estas kulpa; mi estis filo dorlotata kaj sola de mia patrino; sufiĉe frue ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala; la decidoj pri lingvaj aferoj apartenas sole al la L.K.; sole en okcidenta Afriko ekzistas ses aŭ sep literaturoj.

IGI kaj IĜI.

Laboro lacigas; tiu flamo lumas, sed tute ne varmigas; igas necese, ke ni venku; ni devas labori por kunigi, ne por disigi; krucigi bastonojn; garbigi grenon; polvigi; vicigi; gustigi manĝon; albordigi; enkadrigi; enkorpigi; enkasigi; endanĝerigi; endormigi; enuigi; kuŝigi; starigi; pendigi.

La situacio akriĝas; larmoj virinaj baldaŭ sekiĝas; aliĝi al ia ideo; kuniĝi en la domo de siaj gepatroj; aliĝi al ia ideo; tagiĝas; post longa vintro printempiĝas; enlitiĝi; surteriĝi; mia ĉapo, flugante, pendiĝis sur la branĉoj de la arbo; laŭ sia laboro laboristo taksigi; sub la sankta signo de l'espero kolektiĝas pacaj batalantoj; malfruiĝi.

Dormema. "Francisko, vi denove tre longe dormis hodiaŭ matene. Kion tio signifas?" - "Mi ne scias, panjo, eble estas kaŭzo, ke mi tiel malrapide dormas."

Preĝo de lernantino. "Kara Dio, Vi estas ĉiopova, faru ke Budapesto estu ĉefurbo de Rumanujo!" - "Sed, mia infaneto, kian intereson vi havas je tio?" - "Ĉar mi tion skribis kiel lernejan taskon."

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

29. VII. 1947.

Kial ĝuste Esperanto?

Okazas ofte dum diskutoj inter homoj, kiuj estas konvinkitaj pri neceso de internacia lingvo, ke ili demandas nin, esperantistojn, kial ni tiel persiste postulas, ke nepre Esperanto fariĝu la internacia lingvo. Ili diras, ke estas tiom da mondlingvaj projektoj, el kiuj laŭ ilia opinio oni povus elekti eventuale ian pli taŭgan, ol estas nia kara Esperanto. Eĉ se ni facile povas pruvi, ke Esperanto montriĝis ĝis nun kiel la plej taŭga interkomprenilo kaj kiel la sola lingvo internacia, kiu estas jam vaste uzata en internaciaj rondoj. Tamen ni neniam forgesu unu gravan faktoron, kiu rajtigas Esperanton antaŭ ĉiuj aliaj lingvoprojektoj fariĝi "la internacia lingvo".

Estas la Interna ideo, kiun donis al nia kara lingvo nia amata Majstro, Dr. L. L. Zamenhof. Tiu nobla ideo donas al nia lingvo la spiriton, kiu igas ĝin daŭre vivi kaj kreski. Speciale en la nuna tempo post tiu terura milito la homaro bezonas urĝe la belan, noblan, homaman ideon de nia lingvo, kiu povus forigi la barojn de malamo, malestimo, miskompreno kaj netoleremo inter la nacioj, kiu povus pere de nia komuna lingvo Esperanto alproksimigi ĉiujn naciojn kaj semi la ideojn de homamo, frateco kaj interkompreno. Tiu interna ideo, kiu sukcesis, ke post du teruraj militoj ĝiaj pioniroj ĉiam denove kolektiĝis, ke la flamo de ilia entuziasmo, malgraŭ tiuj malhelpaĵoj neniam estingiĝis, ke ĝi, ĉiam denove ekbrilas kaj allogas daŭre novajn adeptojn de nia lingvo. Tiu sankta ideo, kiu jam neniam povas esti elŝirata el la koroj kaj cerboj de la granda tutmonda familio esperantista. Tiu alta ideo, kiu gvidas kaj kondukas la homaron en pli feliĉan kaj pacan estontecon. Ni ĉiuj do estu kaj restu la pioniroj de tiu bela, alta, nobla ideo. Nun aŭ neniam estas la plej bona okazo semadi inter la nacioj de la restariĝanta mondo nian altan idealon. Ni laboru konstante ĉie kaj ĉiam, ni ne laciĝu en nia penado kaj la venko estos nia.

Fr. Heikenwalder.

Gala Petrova
(16jara), Novosibirsk.

ŜI.

Estis vi tiel bela
Kiel princino de l' Nord',
En viaj okuloj belaj
Mi legis pri mia sort'.

Ekridetis vi varme
Al mi - ekstremis la kor'
Kaj ĉiuj suferoj kaj larmoj.
Subite flugetis for.

Korekto de preseraro. En la poemo de Nr. L. L. Zamenhof; Al la "Esperantisto", aperinta en V.V.D. de la 26a VII, forstreku la artikolon en la unua frazo "En la bona hor'!" kaj la lastan vorton en la poemo "Alveninta" korektu je "alvenita".

NOVAĴOJ

Dneŝnĵi program:

Pro ŭĉastnĵiky řeĉnickĵeho kursu, bude v 17 hod. lekce na pŵirodnĵm jeviřti v parku. Ŭĉastnĵici druhĵyĉ kursŵ vĵtĵni.

Veĉer nĵvřřtĵeva skautskĵeho tĵboru u Kumorskĵeho jezera. Bliřři informace na vĵyvěsnĵi tabuli ve řkole.

Letnĵi řkolu esperanta navřřtĵivili vzĵcniĵi hostě, pan Fr. Heikenwalder, bĵv. redaktor "Ligila" a panĵi Heřmanskĵ-Malĵ, zakladatelka "Virina Esperantista Rondeto en Praha".

Raporto pri dimanĉa ekskurso.

Post longa diskutado kaj elektado fine la grandega esperantista karavanego decidiĝis pilgrimi al nia montaro. Ekipita per dorsosakoj, plenaj je nutraĵoj, la karavano forveturis nur kun unuhora malfruiĝo en du aŭtobusoj, ornamitaj per multaj flagetoj al la monto Jeřřěd (Esp: ankoraŭ-d.). Spite al la malfruiĝo la partoprenantoj kantis la Esperantajn kaj ĉeĥajn kantojn. Post ĉirkaŭ unuhora veturo difektiĝis unu rado de aŭtobuso. (Malicaj klaĉemuloj asertas, ke la akcidenton kaŭzis certa sinjorina mořto pro sia pezeco.) Tiamaniere la malfruiĝo pligrandiĝis je unu horo. Antaŭ la 14 h. ni atingis la ŝnur-fervojon en Liberec kaj post duonhora ŝvebado super la deklivoj de Jeřřěd ni iom post iom troviĝis en la restoracio, kie atendis nin la liberecanoj. Post la tagmanĝo bonvenigis nin s-ano Novotnĵy kiel Repe de l'oka regiono kaj s-ano Ing. Fanta en la nomo de la "libereca" klubo. Post la komuna fotografado ni adiaŭis la Liberecanojn kaj veturis al nia hejmo, Dum la vojaĝo denove regis ĉie bona humoro. La belegaj kantoj de la koncert-kantistino s-ino Zachovĵ tre plaĉis al ĉiuj anoj kaj igis ilin forgesi la malagrablajojn de la longa vojaĝo. Ni intencis viziti la kastelon Bezdĵz, sed nian intencon fuřis la jam la duan fojon trapikita aertubo de l' aŭtobuso. La interrompon de la vojaĝo eluzis multaj s-anoj por vizito de proksima gastejo. La karavano revenis hejmen je la 20a horo en tre bona humoro. La ekskurson partoprenis - gesamideanoj.

Klaĉoj de LIBBRECa babilaĉulo.

Se ŝi havas maron kiel celon, ŝi estas Marcelo. Se li buře parolas, ne parolas Libuře. Trisenco.

Ne estas sekreto, se kreto estas en sek-reto. Dusenco.

Ne estas ĉevalo, starante ĉe valo. Ne estas ĉerizo, estante ĉe rizo.

Demandoj. Ĉu demono devenas de mono? Ĉu de poto devenas depoto?

GRATULO.

Sinjoro Emil M ŭ l l e r, urba ĉefkonsilisto kaj multjara estro de la Esperantista Klubo de Praha - Malĵ Strana festas sian 60jaran jubileon. Bonan sanon kaj feliĉon dum la plua agado deziras al li la esperantistaro en Doksy kaj Starĵ Splavy.

ANONCOJ.

Mi iras serĉi rememoron,

se volas vi, iru kun mi.

Mi serĉas ruĝan, bluan floron.

Ĉu povas ĝi min relumi?

Feliĉo Elnordo.

RESPONDO al "Mi nur akceptas dolĉan rekompencan".

Privatajn lecionojn kaj konversacion mi bezonus. Sed diru, kie mi trovos kompencan por vi?

Unue mi ne estas bela, ĉar mi ne ruĝigas miajn lipojn pro manko da mono! Helpu! Helpu!

"Loganta kursanino".

KROMELDONO de la VERDA VOĈO de DOKSY

Origina sciigo de nia speciala raportisto.

Oni sciigas nin telegrafe, ke en la urbo DOKSY, la fame konata banloko kaj somerrestadejo de nenifarantoj kaj de geverduloj, la 29an de Julio je la 10a horo vespere, subite eksonis la urba sireno (komprenu: fajfilego, ne la mita estaĵo aŭ la s-ino Vazelina Gomenol).

Post mallonga tempo bruegis la sirenoj de la tuta ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj de ĉiuj flankoj eblaj, eĉ neeblaj alveturis fajrobrigadoj al monteto proksima al urbo. Oni konstatis, la Geverdideanoj kolektiĝis sur la montetoj kaj laŭ la kutimo de indianoj aŭ eble kaŭze de siaj infanecaj ideoj bruligis fajregon tiel grandan, ke eĉ la apude troviĝanta lageto estis minacata de forbrulo. Post klarigo de la afero kaj lokalizo de la fajro, la fajrobrigadoj revenis al siaj hejmoj.

Memkompreneble, la brulkrimuloj suferos la konsekvencojn de sia malprudenta ago.

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

31. VII. 1947.

Varboparolo al neesperantistoj.

Sinjoroj kaj sinjorinoj, ĉu vi volas vojaĝi, ĉu vi volas viziti multajn landojn de la terglobo?

Jes, en viaj okuloj ni vidas ardan deziron kaj jam la respondon: jam de nia plej frua aĝo mi arde deziras ekvidi la tutan mondon, sed tuj en via penso vi demandas, kianiere vi interkonpreniĝos. Tiom da lingvoj oni ne povas ellerni. Kaj jen, ni estas ĉe la kerno de malfacilaĵoj. Multlingveco, nekonprenado, malfido. En la tempo de la granda tekniko: trajno, vaporŝipo, aviadilo, telegrafo, telefono, radio, televisio oni devas havi internacian helplingvon. Tiu ĉi lingvo estas Esperanto. Lernu do Esperanton, viaj deziroj plenumiĝos. Antaŭ ol viaj monrimedoj sufiĉos por vojaĝo, vi ĝuos feliĉan mondvojaĝon per korespondado. Per korespondado vi trovos geamikojn en la tuta mondo. Vi ekscios pri la moroj, kutimoj, vivmaniero, laboro de diversaj popoloj.

Kaj poste, se via sopiro efektiviĝos kaj vi faros grandan vojaĝon kun verda stelo (nia Esperanta simbolo), vi trairos tutan nondon, trovante ĉie amikojn. Mi rekonendas al vi: lernu Esperanton.

A. Slanina.

Dr. A. Pitlík:

Ĉu amikeco aŭ amo.

Ĉu tempon malŝpari, knabino amata,
ludante per brilaj vortetoj,
ĉu ilin vicigi kaj ordi, por fine
penetri al iaĵ sekretoj?

Ĉu flustru ni, kio en niaj animoj,
mistere kaŝita, postrestas?
Sur nia tempio ĵan haroj griziĝas,
eĉ vi plu infano ne estas!

Pokalo da amo, por ni preparita,
surtablo invitas nin nune.
Ĉu ni do hezitu, amata knabino,
ĝis fundo eltrinki ĝin kune?

Trad. prof. M. Lukáš.

NOVAĴOJ.

Dnes odpoledne koupání. Na pozvání skautů večer táborový oheň ve Starých Splavech. Sraz v 19 hodin "U Jelena", odchod přesně ve 20 hodin, něboť nám pošlou spojku naproti. Připravte si repertoár.

B E R N.

Svisa radiostacio elsendas sur mallonga ondo 31,47 metroj paroladojn de diversnaciaj delegitoj, partoprenantaj la Universalan Kongreson. Sabate parolis f-ino Zamenhof. Elsendoj okazas ĉiutage je la 18a horo de la svisa tempo. Kiu volas aŭskulti, ni rekomendas kontroli tempon de la 17a horo ĝis la 19a horo. Raportu al ni, ĉu vi kaptis la ondon.

SALUTO.

SEL-on salutas kore konata ekonomo, Dro Marko Weirich.

Diras forĝisto al nova lernanto: "Vi devas fari precize tion, kion mi al vi diros, aŭ vi fariĝos fuŝulo. Nun rigardu tiun ĉi pecon da fero. Tenu firme la martelon." - "Jes". - "Bone, kiam mi movsignos per kapo, ekbatu!" La forĝisto konsciiĝis nur en malsanulejo.

LINGVA ANGULO.

La subjunkcioj **dum** kaj **ĝis** funkcias ankaŭ kiel prepozicioj. Ekzemple: *Dum li ne estis hejme, oni prirabis lian loĝejon. Longa tempo pasis, ĝis oni elkonstruis tiun domon* (subjunkcioj en tempaj subpropozicioj). En la frazo: *Lia patro estis honesta homo, dum li estas fripono* **dum** funkcias konjunkcie. *Mi sendos la artikolon ĝis dimanĉo. Apetito venas dum la manĝado.* (**Ĝis** kaj **dum** funkcias kiel prepozicioj).

La subjunkcio **ĉar** funkcias ankaŭ kiel konjunkcio: *Mi ne povas tien iri, ĉar mi estas malsana.* (subjunkcio). *Li parolas perfekte, kio estas vere miriga, ĉar nur antaŭ nelonge li eklernis la lingvon.* (konjunkcio).

ANEKDOTOJ.

Aŭto faligis iun malpli junan fraŭlinon - feliĉe nenio okazis al ŝi. Kiam ŝi konsciiĝis, demandis policano, kiu intertempe zorgis pri ŝi: "Via adreso, fraŭlino?" Ŝi elspiris ruĝiĝante: "Poste restante".

Malfacila problemo. "Se vi volas sendi ion en redakcejon, skribu nur unuflanke". "Nu jes, sed sur kiu flanko?"

APERAS ĈIUTAGE
Verda Voĉo de Doksy
REDAKTORO ANT. SLANINA
AMUZA GAZETO DE SOMERA ESPERANTO-LERNEJO

NI BEZONAS BONAĴN ORATOROJN"

Ant. Slanina.

La vorto ludas potencon kaj mistikan rolon en la vivo do l' homaro. La vorto estas enkorpigita ideo, la ideo, naskiĝanta en sonon. Kunigitaj vortoj, ligitaj per gramatiko, estas lingvo. Skribita lingvo estas alia, ol lingvo parolata. Ĝi estas gramatike pli preciza, pli logika, sed ne viva. Bona oratoro neniam laŭlitere lernas skribitan prelegon parkere. Esperanto kiel artefarita lingvo jam pro tiu artefariteco havas karakteron iom ne vivan. Sed tio ne estas kulpo de Esperanto, la kulpon ni serĉu alie. Multaj gesamideanoj posedas lingvon nur skribe (t.e. skribante kaj leĝante ĝin). Ili perfekte skribas, legas kaj ĉion komprenas, sed bedaŭrinde mankas al ili elokventa parolkapableco. Ni esperantistoj estas samtempe propagandistoj. Ni volas, ke la ceteraj homoj lernu Esperanton. Do ni devas montri vivecon kaj belsonecon de Esperanto al la publiko. Precipe ni estu bonaj oratoroj. Veninte eksterlanden al Universalaj kongresoj aŭ vizitante diversajn klubojn ni estas devigataj paroli. Ni estas kvazaŭ diplomataj senditoj kaj malbonaj diplomatoj ni estus, se ni ne scius elokvente paroli, sen preparo reagante tuj al ĉiu situacio. Nuna epoko postulas de ĉiuj homoj, ke ili fariĝu elokventaj. La vorto estas nova batalilo kaj kvankam ĝi aspektas subtila, ĝi estas la plej potenca. Vi posedas lingvon, miraklan lingvon kaj nun dependas de vi, kiel vi ĝin uzos, ĉu por bono aŭ ĉu por malbono. La vojo al la bono estas iom pli malfacila, sed la celo atingita valoras penadon.

Fr. P e l:

BETULALEO.

/Al M.N./

Mi iam ŝin renkontis,
ne scias mi precize-
en koro am'ekfontis
tro pene kaj surprize.

Vespere malluniĝis -
nur nudaj betuletoj
silente ebriiĝis
de blankaj siluetoj...

Ŝi paŝis nepre sola -
antaŭen kapon klinis:
lum' tute aŭreola'
estaĵon ŝian limis...

"Ho, haltu, dolĉa ino
Estantec' malaperas. .
kaj sorĉa halucino
nebule efemeris----

Sed vane vana krio -
vespere mallumiĝis -
Jen! - restis fantazio...
Betuloj mutaj iĝis

NOVAĴOJ.

Dnes: Večer lidových a umělých písní v sále "U Jelena". Začátek ve 21 hodin. Vstup na legitimaci Letní školy. Odpoledne v 17 hodin řečnický kurs na přírodním jevišti. (Místo včerejšího, který byl odložen). PROSÍME, aby v zájmu udržení pořádku navštěvovali žáci kursy včas.

DIVADLO.

V sobotu 26.VII. byla sehrána Jaroslava Vrchlického historická komedie "Noc na Karlštejně" v esperantském překladu prof. Mil. Lukáše. Provedení hry bylo bezvadné až na nepatrná přeřeknutí. Svými výkony zvláště překvapili pp. Severa v úloze Petra, krále z Cypru, Rýdl jako Ješek z Wartenberka, Smotlák jako Karel IV. Rovněž vysokou úroveň prokázala sl. Slunéčková v úloze Aleny, sl. Žaludová v úloze Elišky, pan Sedlák v úloze vévody Bavorského a pan Skála jako Pešek Hlavně jako královský číšník. Nelze opomenouti velmi dobré hry pana Ehrenberga v úloze Arnošta, arcibiskupa pražského. Všichni podali výkon víc než uspokojivý. Celkovou úroveň hry zvláště umožnila bezvadná režie pana Rýdla a přírodní kulisa působila dojmem skutečnosti. Hra splnila svůj účel dokonale. Doufáme, že spolupráce ochotnického spolku "K.H. Mácha" v Doksech se Školou esperanta v Doksech se bude nadále zdárně vyvíjet a že se nám podaří uskutečnit náš sen o zájezdu divadelního souboru do ciziny, který by v esperantské transskripci předvedl perly naší české dramatické tvorby v cizině.

Upřímný dík za krásný večer.

NI LERNU PER LA VORTLUDOJ.

Pendreko estas pendanta reko (hrazda).

Pendreklamaĵoj ne estas pendrek-lamaĵoj.

Muzo ne estas muso!

Mantuko – ručník.

Mantukino neĝi ručnice!

Pallaca sanideano ne estas sanideano, loĝanta en palaco.

ANEKDOJ.

Soldato petis sian oficiron por forperneso, asertante, ke lia edzino lin bezonas hejme ĉe rikolto. Ne eble, respondas la oficiro. "Kaj krom tio skribis al mi via edzino, ke ĉe vi hejme estas ĉio en la plej bona ordo." Seniluziigita soldato salutas, kunpuŝas kalkanojn kaj foriras. Sed ĉe la pordo li returniĝas: "Sinjoro oficiro, vi opinias, ke vi havas modelan regimenton. Sed bedaŭrinde, en la regimento estas du teruraj mensoguloj. Unu de ili estas mi. Mi volis trompi vin. Mi nome absolute havas neniun edzinon."

ANONCOJ.

"**Fidela esperantistino**". Bonvolu vin anonci tuj persone aŭ perletero en lernejo. Necesas fiksi tempon de la rendevuo.

FRAŬLINO, kiu volas fariĝi saĝa kaj plej profita en Doksy, bezonas necese vivan Verdan vortaron, kiu enhavas ĉion. Ĝi povas esti ankaŭ pli malnova. Skribu sub signo "Scivolulino".

LETERKESTO.

Avidajn sinjorojn ni atentigas, ke samideano Kokineto ne plu vendas ruĝajn ĉerizojn, ĉar li volas fari kompton (ne komploton).

Al N.S. En vorto **vokita** oni ne skribas ypsilonon, sed Esperantan -y-. Vorto **vokata** ne signifas **vokata**.

Esperantista

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9 – Redaktas dr. Stan. Kamarýt

SOMERA ESPERANTO-LERNEJO EN DOKSY

aranĝos de la 19. VII.—2. VIII. 1947 (atentu la ŝangitan daton!) la jenajn kursojn: 1. **elementan** (por komencantoj); 2. **superan** (konversacian) kaj 3. **Esperantan seminarion** por la aktivaj esperantistoj (funkciuloj), instruistoj de Espo kaj tiuj, kiuj deziras regi Espon same kiel sian gepatran lingvon. En la seminario oni prelegos: pri la specialaĵoj de la Espo gramatiko, historio de la E-movado (enlanda kaj internacia), E-literaturo, pedagogia avantaĝo de la instrua Ĉe-metodo, oratora arto, E. en praktiko k. s.

Instruos kaj prelegos: PhDr. A. Pitlík, lektoro de Espo ĉe la Alta lernejo por specialaj sciencoj en Praha, K. Šolc kaj V. Špūr, ŝtate ekzamenitaj instruistoj de E, J. Hanuš kaj A. Slanina, diplomitoj de EAĈSR, k. a.

Ĝis nun estas fiksitaj la jenaj entreprenoj kaj amuzaĵoj por la vizitontoj de la Lernejo: Festkunveno okaze de la 60-jara datreveno de la estiĝo de E., Espo prezentado de la komedio „Nokto en Karlův Týn“ de Vrchlický, vespero de l' "Arta kanto en ĉeĥa muziko", letervespero internacia, somera karnavalo, aŭtomobilaj ekskursoj al Bezděz kaj Ještěd. La solena malfermo de la Lernejo kaj la karnavalo okazos en la salonego de la doksa kastelo. Oni atendas ĉeeston de la eksterlandaj esperantistaj gastoj.

Kiu intencas pasigi agrablan someran libertempon kaj forpermeson en la amika esperantista medio, partoprenu la kursaron en Doksy, ĉirkaŭita per naturaj belaĵoj de la "Ĉeĥa maro" Lago de Mácha! Ĉar la nombro de la ĉeestantoj estas limigita, petu tuj tiurilatajn informojn kaj aliĝilon de s-ano K. Šolc, Mladá Boleslav I, Železná 41.

La prepara komitato.

Je memoro al la „Somera Esperanto-Lernejo“ en Doksy (19. VII—2. VIII, 1947)

SUR LA LAGO DE MÁCHA (Dr. A. Pitlik)

Ha, lago de Mácha, la amopoet'!
"Kun mi en la barkon rapidu,
mi vian hararon orblondan, knabin',
trempiĝi ne lasos - min fidu!

Estante pelata de milda zefir',
balance moviĝos la barko,
fabelon mi volas rakonti al vi
pri amo kaj unu monarko.“

La koron konfidis al mi la knabin',
feinoj dancante nin lulis
kaj en la mistere ondanta nivel'
arbaroj sin klare spegulis.

"Ho, kisu min, knabo, kisadu min plu,
ve pri la perditaj momentoj,
la celon maltrafus ja nia dezir'
sen amo, sen larmoj aŭ sentoj.“ -


Kapturnon sentante, revenas la du
al urbo, ebriaj de amo. -
Sur lago de Mácha, sub Bezděz-katstel'
buntiĝis ilia programo . . .

El ĉeĥa manuskripto trad. M. Lukáš.

KRONIKO ENLANDA

Somera Esperanto-lernejo en Doksy 19. VII. ĝis 2. VIII. havis tiun ĉi jaron ankoraŭ pli grandan sukceson ol pasintjare. Aliĝis sume 110 p. (57 viroj, 53 virinoj) el 56 lokoj. Laŭ profesio estis oficistoj 26, studentoj 13, instruistoj 12, komercistoj 7, profesoroj 4, lernejdirektoroj 3, inĝenieroj 2, juristoj 2, tipografoj 2, kuracisto 1, ĵurnalisto 1, diversaj 37. El fremdlando partoprenis en la kursoj: svedino Karla Jónsson el Ystad, jugoslavo J. Ditrich, polino J. L. Šrajbrová, kiuj ĉiuj tri ricevis ateston pri kursfina ekzameno de la triagrada kurso (seminario). Krome partoprenis en la Lernejo gaste nederlandano J. J. Verdonk kaj svedino Anna Alamo. Ateston pri kursfina ekzameno ricevis 102 p., pri partopreno 8 p. Kromĉe venis multaj gastoj, kiuj partoprenis laŭ sia plaĉo diversajn entreprenojn amuzajn kaj klerigajn.

La aranĝoj iris laŭ programo sur paĝo 58. Interkonatiga vespero en Grandhotelo la 19-an de julio estis inaŭgurita de direktoro de la Lernejo lektoro Dr. A. Pitlík kaj la kursanoj estis salutitaj de s-ro J. Dušátko en nomo de Loka kleriga konsilantaro. Dimanĉon estis je la 9-a horo solena malfermo de la Lernejo. La partoprenantoj estis akceptitaj en urbodomo de urbestro s-ro V. Vachuška, kiu bonvenigis ilin ĉeĥ- kaj esperantlingve. Precipe kortuŝaj estis liaj vortoj al la fremdaj gastoj, kiuj dankis pro ili al la urbestro kaj subskribis sin en la memorlibron. Post la akcepto kolektiĝis la kursanoj apud la flago-masto antaŭ la urbodomo kaj dum la himno estis hisita Esperanto-flago. La urba disaŭdigo estis informinta la publikon pri tiu ceremonio. Poste je la 13,30 horo komencis instruado en ĉiuj tri kursoj.



*Instruistoj en Somera Esperanto-lernejo en Doksy 1947.
J. Hanuš, V. Špūr, Dr. A. Pitlík, K. Šolc, A. Slanina.*

En kurso A (elementa) instruis K. Šolc kiel kursestro kaj A. Slanina kun V. Špūr, en kurso B (progresintoj) V. Špūr kiel estro kaj J. Hanuš kun K. Šolc, en kurso C (seminario) Dr. A. Pitlík kiel estro kaj ĉefpreleganto, A. Slanina kiel gvidanto de oratora kurso kaj K. Šolc por prezenti modelajn Cseh-metodajn lecionojn. Instruado daŭris ĉiutage 8,30—12,30 h. En kurso A estis donita kompleta

materio de la Cseh-metodo kaj estis aldonitaj kantoj. En kurso B estis prezentitaj gramatiko kaj konversacio aparte.

En kurso C prezentis lektoro Dr. Pitlík analizon de ĉiuj lingvaj problemoj, evoluon de internacia lingvo. Esperanto-literaturon, historion de la movado kaj organizado. Tiel fariĝis la seminario bonega preparo por tiuj, kiuj volas fari ekzamenon pri kapableco. La Ekzamena komisiono Asocia traktas pri ebleco, ke ĝi kunsidu venontjare post finiĝo de la kursoj.

Ankaŭ la posttagmezaj kaj vesperaj aranĝoj kontentigis ĉiujn. Sur la lagobordo kunvokadis kursanojn kaj gastojn verda flago kaj ĉirkaŭ ĝia masto bruis daŭre aro samideana en gaja kaj entuziasma humoro. Daŭre bonega vetero helpis konstante al tiu kontenteco. En la remboata konkurado akiris premiojn: 1. J. Jestřáb, 2. M. Braslavec, 3. V. Šob, 4. F. Hájek, 5. L. Obruča.

En tuttaga ekskurso al Ještěd partoprenis 86 p. Sur la monto renkontiĝis la kursanoj kun samideanoj el Liberec, salutitaj de la E. Klubo-prezidanto Ing. Fanta kaj regiona peranto T. Novotný.



Klaso de la Lernejo en Doksy.

La plej grandan resonon havis prezento de Nokto en Karlův Týn en Lukáš-traduko. Ludis 26. VII. amatora societo K. H. Mácha en Doksy, reĝisoris s-ro J. Rýdl en subĉiela teatro en kadro de amatora teatra festivalo. La sukceso estis brila ankaŭ ĉe neesperantista publiko. Belaj esperantlingvaj programoj, por tiu ĉi prezento eldonitaj, estas ankoraŭ riceveblaj ĉe V. Špŭr en Doksy.

Koncerto de Popola kaj artefarita kanto esperantlingve la 30-an de julio eminentis pro la tradukaĵoj. Kantis samideanino Růžena Zachová, multe kaj sincere aplaŭdata pro sia arto.

Bivakaj fajroj estis du, la unua ne lasos forgesi prezentem de s-o Reichman, la dua, organizita por nia Lernejo de skoltoj en tendaro en Staré Splavy, kunvenigis multajn. Bonhumoraj kantaĵoj skoltaj, salutparoladeto de skolto-esperantisto, teatraĵetoj, improvizita sceno de aktoroj-

esperantistoj, kiuj prezentis malceremonieman fervojiston (Mothejzík), embarasatan en malgranda forgesita stacidomo de aro konsistanta el anglo, hungaro, turko, ruso, ĥino, nigra afrikano; la drama konflikto estas tiom facile genie solvita, ke eĉ la vortojn ŝparanta nederlandano Verdonk ekparolis por eldiri dankojn al la skoltoj pro la bonega aranĝo.

Filmvesperon prizorgis nelacigebla s-o A. Slanina. Prelego de s-ino A. Alamo pri Svedlando faris grandan impreson pro la simpla elkora prezento.

Adiaŭa aranĝo estis somera karnavalo la 1-an de aŭgusto en hotelo Jelen. Estis prezentitaj tre sukcesa sceno de s-oj Mothejzík kun kunuloj kaj teatraĵeto verkita de Slanina.

Por informi la kursanojn estis eldonata multobligata bulteno Verda Voĉo de Doksy, kiu, redaktata de A. Slanina, fidele kaj sprite raportis ĉiutage pri ĉiuj okazintaĵoj. Ĉiumatene svarmis ĉirkaŭ la „ĉarma markizino" la ĵurnalon kolportanta viroj kaj virinoj por ricevi sian ekzempleron. Laŭ deziroj de la Doksanoj estos al ili tiu ĉi bulteno sendata ĉiun monaton por refreŝigi iliajn rememorojn pri Doksy kaj iniciati kaj konservi senton de amikeco reciproka inter ili.

La signifo de la Lernejo por nia movado interne estas evidente tre granda, ĉar ĝi kaŭzis grandan kreskon de funda scio de la lingvo ĉe multaj. Sed ankaŭ influo al la neesperantista publiko estis rímarkinda. Ĝi estis la plej efika metodo propaganda, ĉar ĝi propagandas sen prediki. Krome oni uzis paŭzon dum unu ĉeĥa teatra prezentado por paroligi s-inon Alamo kaj s-on Verdonk, kiuj salutis la publikon je nomo de siaj nacioj. Iliaj alparoloj estis sincere aplaŭdataj.

La kursanoj kaj la publiko, adiaŭante post du semajnoj, deziris al si sincere kaj laŭte: je revido post unu jaro!

(V. Špŭr.)